

ENKONDUKO AL EPIZODO KVAR

- INSTRUISTO Saluton! Bonvenon al leciono kvar. Ĉu vi memoras kio okazis en leciono 3? Georgo iris al la vendejo de S-ino Bundo kaj akcidente rompita vazon.
- FLORA Ho, ve - mia vazo! Rompita! Ve!
- INSTRUISTO Poste, S-ino Bundo dankis al Georgo per botelo da vodko. Georgo akcidente trinkis la tutan botelon da vodko kaj ebriiĝis.
- GEORGO En la mondon venis nova sento.
- INSTRUISTO Kaj kio pri Ruselo? La stulta detektivo provis kapti lin kaj Ruselo devis forkuri.
- DETEKTIVO Silentu! Stelistoj ne plaĉas al mi! Vi...ankaŭ la ŝafo...al la policejo!
- FILISA Ruselo ne estas ŝtelisto...
- DETEKTIVO Al la policejo!
- RUSELO Ne! La ŝafo ne iros. Policejoj ne plaĉas al ŝafoj...ili ne plaĉas al ŝafistoj. Kaj mi ne estas ŝtelisto...ne!
- DETEKTIVO Haltu! Revenu!
- INSTRUISTO Jam estas tempo reveni al nia historio. Atentu la sonojn de la vokaloj de Ruselo en la parko; **a, e, i, o, u**. Vokaloj tre gravas; **a, e, i, o, u**. Do rigardu, aŭskultu, kaj ĝuu.

SCENO 1 (EN LA PARKO)

- RUSELO A! E! I! O! U! Ve ... ! Kie mi estas? Ho ... mi memoras! Kaj la doloro! La kapo doloras min ... la brakoj doloras min ... la manoj, la kolo ... la kruroj! Ili doloras min. Kaj vi, kara ŝafo ... kiel vi fartas? Ĉu vi bone dormis? Mi ne! Mi havas du krurojn, kaj ili doloras min ... sed vi havas kvar krurojn, do ili duoble doloras vin. Jes, jes, kara ŝafo: matematiko. Du oble du estas kvar ...
Jes, jes ... du oble du estas kvar ... Du kruroj: doloro; kvar kruroj: duobla doloro. Ĉu ne, amiko mia? Ah! Sed mi forgesis. La parko plaĉas al vi ... la freŝa aero. Sed verdire, ŝafo, mi preferas liton ... komfortan, grandan liton. Sed, ve! En parko ne ekzistas litoj. En parko ekzistas nur floroj, herbo kaj arboj ... kaj eble sovaĝaj bestoj ... leonoj, tigroj. Ho, ve ... tie ni dormis ... malbone dormis ... sur la herbo, sub la arboj.
- Kaj nun mi malsatas ... terure malsatas! Kioma horo estas? La sepa dek kvin ... kvarono post la sepa! Matenmanĝo-horo! Ĉu vi malsatas, ŝafo? Certe ne ... vi manĝas herbon. Vi havas bonan ŝancon ... jen via matenmanĝo. Sed herbo ne plaĉas al mi... mi abomenas herbon ... mi abomenas ĝin! Aj ... dekoble, centoble, miloble ... ve! Ah ... Ĉio doloras min! La dorso, la kruroj ... ve! Do venu, kara ŝafo ... Ni serĉos ... ni serĉos nian matenmanĝon!
- Ve! Mia mono! Ĝi estas for! La stulta, surda detektivo prenis miajn kvincent stelojn ... li ŝtelis mian monon! Li estas ŝtelisto, ne mi! Sed nun ... ho, ve, amiko mia ... mankas al ni mono! Kion ni faros ... kion?

SCENO 2 (BONVOLO-HEJMO)

- FILISA Filozofoj ... filozofoj! Ho, Georgo mia! Georgo! Kio okazis? Kio okazis al vi? Ho, Helena! ... finfine! Diru ... ! Ĉu vi serĉis lin ... ĉu vi serĉis Ruselon ... ĉu vi trovis lin? Kie li estas? Kompatinda ŝafisto!
- HELENA Mi ne scias. Mi tute ne scias. Sed ... gratulon! Vi havis bonan ŝancon ... vi trovis paĉjon! Sed, kio estas? Ĉu li dormas? Ĉu li estas malsana?
- FILISA Kompreneble li estas malsana! Kia stultulo ... li drinkis ... drinkaĉis ... ebriiĝis!
- HELENA Kio ... ? Drinkis ... drinkaĉis ... ebriiĝis? Paĉjo ... ebria? Sed ... li preferas mineralan akvon, aŭ orang-sukon, pom-sukon.
- FILISA Mi scias ...
- HELENA Li trinkas teon aŭ kafon ...

- FILISA Jes, ja ...
- HELENA Do ... kion li trinkis?
- FILISA Vodkon, Helena ... li trinkis vodkon ... plenan botelon da vodko!
- GEORGO Ve ... ho, ve! La kapo ... oh, la kapo doloras min ... sed mi pagos ... la rompitan vazon ... jes, ja ... volonte mi pagos!
- HELENA Kion li babilas ... ? Rompita vazo ... ? Kial ... rompita vazo?
- FILISA Mi ne scias. Li babilas kaj babilas. Mi ne komprenas. Li ankoraŭ ebrias. Kaj certe pagas ... pro kapdoloro!
- SCENO 3 (VENDEJO)
- FLORA Ho, jes ... en mia Esperanto-vendejo mi havas kolĉenojn ... mi havas bildojn ... mi havas lampojn kaj korbojn ... varojn el la tuta mondo.
- KENĜI Do ... via vendejo estas vere internacia, ĉu ne?
- FLORA Certe ... dank' al Esperanto, kaj dank' al esperantistoj, ĝi estas vere internacia. Mi vendas varojn el Eŭropo ... varojn el Azio ... kaj imagu! Ĉio en mia vendejo ... la brakhorloĝoj, la plumoj, kaj tiel plu ... ĉio venas de esperantistoj.
- KENĜI Do ... perfekta Esperanto-vendejo! Tamen ... ĉu ... ne ekzistas problemoj? Kial ... ? Kial vi havas problemojn?
- FLORA Ho ... nu! Simple, ĉar la klientoj ...
- KENĜI Kio ... ? Mia intervjuo! Interrompita!
- DETEKTIVO Bonan matenon! Espereble mi ne interrompas vin ...
- KENĜI / FLORA Jes! / Ne!
- FLORA Kliento ... ! Espereble li estas kliento ... !
- DETEKTIVO Ho ... mi ne estas kliento, sinjorino ... kaj mi ne estas surdulo.
- FLORA Ho ... pardonon ... !
- DETEKTIVO Egale ... ! Ne gravas! Tamen ... mi estas ja detektivo ...
- FLORA Detektivo ... ! La polico ... ! Ve! Helpu ... mi svenas! Mi falas! Mi mortas!
- SCENO 4 (BONVOLO-HEJMO)
- FILISA Kompatinda Georgo ... kaj kompatinda Ruselo. Diru ... kie vi serĉis lin? Kaj kial vi ne trovis lin?
- HELENA Ho ... mi ne scias. Mi serĉis lin ĉie ... mi serĉis lin ĉe la muzeo, ĉe la artgalerio, ĉe la vendejoj, kaj tiel plu, kaj tiel plu. Mi serĉis lin eĉ ĉe la bestoĝardeno ...
- FILISA Bestoĝardenoj ne plaĉas al li.
- HELENA Mi scias ... mi scias. Tamen mi serĉis lin tie ... ankaŭ en la parko.
- FILISA Ĉu ... ? Sed la parko estas danĝera. Estas stranguloj en la parko ...
- HELENA Ho, panjo ... trankviliĝu! Mi vidis nur unu strangulon en la parko ... ulon kun pakaĵo ... sed ve! Mi ne vidis Ruselon.
- FILISA Kompatinda Helena. Aŭskultu ... mi preparos trinkaĵon por vi. Nu ... teo estas bona trinkaĵo por skulptisto ... ĉu ne?
- HELENA Ho, jes ... certe. Sed ... hodiaŭ mi preferas akvon ... eble ... mineralan akvon.
- GEORGO Ah, ho! Mi ŝvitas ... ! Oh, mi soifas! Kie ... kie mia minerala akvo ... ?
- HELENA Terure! Rapidu ... akvo ... minerala akvo por paĉjo ... !

- GEORGO Jes! Mi pagos la rompitan vazon ... mi volonte pagos!
- SCENO 5 (VENDEJO)
- FLORA Volonte! Mi pagos ... ! Mi pagos! Ho ... katastrofe! Mi pagos!
- DETEKTIVO Kion ŝi babilas? Ĉu vi scias?
- KENĜI Ne! Mi tute ne komprenas, sinjoro detektivo. Kia mistero!
- DETEKTIVO Rapidu! Akvon ... portu akvon!
- KENĜI Sed kie ... ? Mi ne scias!
- FLORA Jen ... mi havas mineralan akvon ... tie ... botelon da minerala akvo ...
- DETEKTIVO Portu ĝin! Portu! Rapide, sinjoro ... rapide! Nu, sinjorino ... kion vi babilis ... pri pago?
- FLORA Ve! Mi ne kulpas ... ! Kulpas la fakturoj ... la fakturoj!
- KENĜI Do ... mi portis la mineralan akvon.
- DETEKTIVO Sed ... sinjorino ne trinkas el botelo! Portu glason ... glason!
- KENĜI Sed kie ... ? Mi ne scias!
- FLORA Jen ... glaso ... mi havas glason ... tie ...
- DETEKTIVO Nu, sinjorino ... kiaj fakturoj? Kaj kial vi ne pagis?
- FLORA La fakturoj ... pro mia Esperanto-vendejo ... ĉio tro multekosta ... ho! Mi svenas! Mi falas ...
- DETEKTIVO Ne, ne ... vi ne svenas, vi ne falas, kaj vi certe ne mortas. Trankviliĝu!
- KENĜI Jen glaso! Do verŝu ... verŝu la akvon!
- DETEKTIVO Jen ... mi verŝas akvon por vi, sinjorino ... mineralan akvon. Do ... prenu ĝin! Prenu! Kaj trinku!
- SCENO 6 (BONVOLO-HEJMO)
- FILISA Do ... prenu! Prenu ĝin ... kaj trinku!
- GEORGO A! He! Kio ... ? Oh, mia kapo! Doloras min mia kapo!
- FILISA Jen, Georgo ... jen glaso da akvo por vi.
- GEORGO Oh, doloras min la kruroj ... Oh, doloras min la brakoj ... Oh, doloras min la kolo! Ĉie, ĉio doloras min. Sed ... ? Kio ... ? Kiu? Kie mi estas?
- FILISA Ho, ve! Filozofoj!
- HELENA Vi estas ĉe vi, paĉjo. Jen ... trinku la akvon! Vi estas en via domo ... kun via familio. Do ... Jolanda laboras ... ĉe la juĝejo ...
- GEORGO Jolanda ... ? Kiu estas Jolanda? Kiu estas vi? Kaj ŝi ... kiu estas ŝi?
- FILISA Kio ... ?
- GEORGO Mi ne konas vin! Kiu vi estas? Helpu! Polico ... ! Oni tenas min ... sen permeso! En prizono!
- FILISA Kio ... ? En prizono ... ?
- GEORGO Oni tenas min en prizono ... sen permeso! Helpu! Polico!
- HELENA Kion li babilas? Kio estas al li? Li ne konas nin! Ho, filozofoj!

- GEORGO Helpu min! Polico ... ! Sen permeso ... oni tenas min! Aj! Ve! La kapo ... ! Fulmotondras en la kapo!
- FILISA Georgo! Kompreneble vi konas nin! Kaj ne babilu pri prizono! Ni ne tenas vin senpermeso ... tute ne! Rigardu! Jen via domo ... jen via filino, Helena ... jen mi, via edzino ...
- GEORGO Edzino ... ? Ĉu mi havas edzinon?
- FILISA Ho, ve! Filozofoj ... ĉu li forgesas la edzinon? Ho, Georgo! Kara Georgo ... !
- GEORGO For! Kion vi faras ... ? For, virino ... for! Kiu vi estas? Mi jam havas edzinon ... tio estas ... mi ne scias ... Kaj kiu estas tiu Georgo?
- FILISA Kiu vi estas ... ? Ho ... neimageble!
- HELENA Momenton! Mi havas ideon! Brilan ideon! Mi revenos! Atendu!
- SCENO 7 (VENDEJO)
- DETEKTIVO Nu, sinjorino, mi petas vin ... diru al mi ...
- FLORA Ho! Mi diros! Terure! Vi venis pro mia aŭto, ĉu ne?
- DETEKTIVO Via aŭto ... ?
- FLORA Vi vidis mian aŭton! En la urbo! Mi tre pardonpetas ... sed, jes ... mi ŝoforas sen permeso.
- KENĜI Ho, ve ... !
- DETEKTIVO Kio ... ? Vi ŝoforas sen permeso ... ?
- FLORA Pro la fakturoj ... mankis al mi mono ... mi ne pagis la permesilon ... oni ne permesas al mi ...
- DETEKTIVO Interese! Ŝoforas ... sen permeso. Mi raportos la aferon ... ho, jes... al la polico!
- FLORA Ve! Mi svenas! Mi falas! Mi mortas!
- KENĜI Mi tenas vin! Trankviliĝu!
- DETEKTIVO Do ... kiu estas via nomo? Vian nomon, mi petas!
- FLORA Ve! Terure! Katastrofe!
- KENĜI Ŝia nomo estas Flora Bundo, sinjoro detektivo.
- DETEKTIVO Flora ... Flora kio? Literumu, mi petas!
- KENĜI Ho, ve! Fo, lo, o, ro, a ... jen la antaŭnomo ... kaj la familia nomo ... bo, u, no, do o ...
- DETEKTIVO Dankon, sinjorino Bundo. Sed ... jes ... kompreneble mi raportos la aferon.
- FLORA Terure! Ĉu mi iros al la juĝejo ... ?
- DETEKTIVO Mi ne scias Eble!
- FLORA Katastrofe! Ĉu mi iros al prizono?
- DETEKTIVO Mi ne scias Eble!
- KENĜI Ne, ne ... certe ne. Trankviliĝu, mi petas vin. Vi ne iros al prizono pro via aŭto ... pro aŭto-permesilo.
- DETEKTIVO Aŭskultu ... via aŭto verdire ne interesas min. Fakte ... mi ne venis pro via aŭto.
- FLORA Kio ... ? Ne pro la aŭto! Ho, ve! Mi svenas! Mi falas ...

- KENĜI Ne svenu! Ne falu! Kaj certe ne mortu! Mi tenas vin! Mi tenas! Trankviliĝu!
- DETEKTIVO Fakte ... mi venis pro alia afero. Interesas min tiu ĉi ulo ... tiu ĉi aĉulo ... Jen! Ĉu vi konas lin?
- KENĜI Kiu ... ? Tiu ĉi sinjoro ... ?
- DETEKTIVO Ulo danĝera. Ulo stranga ... malafabla. Ni serĉas lin.
- KENĜI Ho, ne. Mi ne konas lin. Mi ne konas danĝerulojn ... strangulojn. Tute ne. Mi estas esperantisto...
- DETEKTIVO Kaj vi, sinjorino ... ĉu vi konas lin? Li ŝtelis monon ... milojn da steloj. Li havas ŝafon.
- FLORA Ŝafon! Ve ... !
- DETEKTIVO Rigardu, sinjorino! Rigardu la fotografaĵon! Ĉu vi konas lin ... jes aŭ ne?
- FLORA Mi ... verdire ... mi ne scias. Eble ... mi ne memoras.
- DETEKTIVO Egale! Mi foriros. Vi tute ne helpas min. Sed memoru! La ulo estas danĝera ... tre danĝera! Li ŝtelas monon ... havas strangan pasporton ... vizitas nian landon senpermeso ... kaj enportis ŝafon! Ho, atendu! Kiam ni trovos lin, li iros al prizono. Kaj ni ja trovos lin ... ĉu vi komprenas? Ni trovos lin!